

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Helpu nin je “Nia Unua Lernolibro de la lingvo”! — Alvoko al niaj eksterlandaj geamikoj —

En la venonta aŭgusto, ni “Esperanto Jokohama” havos ekspozicion, pri Esperanto al la urbanoj, kaj tiam, krom la kutimaj materialoj, ni intencas havi specialan ekspozicion. Pri tio ni petas kunlaboron de vi, esperantistoj ekster Japanio!

Temas pri montrado de la unua lernolibro, kiun vialandaj unuagradaj lernantoj uzas, kun traduko de kelkaj frazoj en tiu libro. Ni scias, ke estas diversaj lingvoj en la mondo, sed kion kaj per kio fakte lernas lernantoj, kiuj unuafoje en la vivo vizitas lernejon. Rekompence, ni sendos al vi tiun materialon — la unua lernolibro de la japana lingvo, kun traduko de kelkaj frazoj en Esperanton. Al kelkaj delegitoj de UEA, ni aparte petos tion.

Jen konkreta peto: (1) Sendu al ni (la adreso sube), lernolibron de la gepatra lingvo, kiun viaj/vialandaj unuagradaj lernantoj de elementa/baza lernejo uzas. (2) Kun ĝi aldonu esperantigitan tradukon de kelkaj el la unuaj paĝoj, kaj ties prononcmankon (laŭeble en Esperantaj literoj). (3) Aldonu jenan informon pri la libro: nomo de la lando, lingvo; en kiu jaraĝo oni lernas per ĝi; ĉu la lernolibro


estas donacita / pruntita al la lernanto, aŭ lernanto devas aĉeti ĝin? (4) Kaj pri vi: nomo, adreso poŝta kaj reta, kaj espereble via foto! Antaŭdankon!

Sibayama Zyun'iti, la prezidanto



paĝo 1

nia japanlingva lernolibro por unuagradanoj



kovrilo

Niaj Klasoj kaj Kursoj

Okazas jenaj klasoj (ĝenerale en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa)

*Regulaj Klasoj en sabato:

- (1) Klaso Esenco por legi “Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia”/(2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: “Vizaĝoj” /
- (3) Daŭriga kurso 2, lernado per “Hanako”/ (4)

Daŭriga kurso 1, tagoj nefiksitaj, lernado per “Hanako”

*Regulaj Klasoj en merkredo:

- (1) Oni legas “La Zamenhof-Strato” de Roman Dobrzyński / (2) Daŭriga kurso: legata libro estas “Barbro kaj Eriko”.

102a Legokunsido

En la 5a de marto, ni havis la 102an Legokunsidon por "**Mara stelo**" de Julian Modest, kaj ses personoj partoprenis.

Pri Julian Modest

AIDA Yayoi

"Mara stelo", kiun mi legis ĉi-foje en nia legokunsido, estis por mi la kvara renkonto kun Julian Modest ekde kiam mi unuafoje renkontis lian libron "Maja pluvo" en 1994. En tiuj 22 jaroj inter 1994 kaj 2016, el liaj verkoj mi legis nur du, "Songe vagi" kaj "La fermita konko". Strange, ke mi legis tiel malmulte, kvankam Modest ĉiam estis ie en mia koro. Li estis por mi kara verkisto, kiu malfermis pordon al esperanta literaturo, kviete kaj tenere. Rememorante tiun pasintan senton mi gustumis lian novelaron "Mara stelo". Ankoraŭ ĉi-foje, tiel nomata Modest-stilo denove ĉarmis min.

Laŭ mi la stilo konsistas el kvietaj kaj leĝeraj etoso, konciza disvolvigo de intrigo, lerta manipulado de facila lingvo, klare reliefigita sceno, ktp. Tiuj trajtoj ne ŝanĝiĝis kompare kun tiuj, kiuj videblis en "La fermita konko", pri kiu mi recenzis por "La Revuo Orienta" en 2003. Mi konfirmis, ke esence Modest tenis sian karakterizan stilon longe kaj fidele. Li ne klarigis detale sed lasis iome al la imago de legantoj. Li verŝajne kredis, ke verkaĵo kompletiĝis per kunlaboro de verkisto kaj leganto.

Pri "Mara stelo", mi diru, ke ĝenerale ĉiuj 21 noveloj estis bonaj. Ili estis diversaj en temo kaj enhavo, kaj pro tio legeblis sentede ĝis la fino. La kvalito estis preskaŭ sama, ne tro alta nek tro malalta, unuvorte sufiĉe taŭga por distraĵo. Iom surprize, ke malgraŭ fekunda kaj rapida verkisto, li ne perdis talenton stimuli ĝojon de legado.

Precipe interesaj rakontoj por mi estis "Doktoro", "Nevidebla knabo", "Hotelo Paradizo", "Tendaro por ŝtelistoj", "Vulpa restoracio". El ili la lasta estis plej kortuŝa, kiu temis pri tragedia amafero inter homo kaj vulpo. Modest spegulis en tiuj verkoj multfacetan homan vivon, en kies malluma fundo implikiĝas sentoj kuraĝiga, ironia, malĝoja, enigma... Kian konkludon li havis pri

interno de homoj? Ĉu li trovis ĝin simpla aŭ komplika? Mi ne scias pri tio, sed li certe ĝuis verkadon.

Novelaro facila kaj familiara

Mizro Iwaya

Mi volas diri antaŭ ĉio ke tiu ĉi libro estas facila kaj familiara al ni. Ĉiu novelpeco estas mallonga, 4/6-paĝa, kaj ĝia skeleto estas simpla. Ĉiu peco konsistas el unu motivo. Mi kredas ke la legantoj povas facile ĝui la mondon prezentitan de la aŭtoro.

La temo estas banala, sed mi vidas ke la aŭtoro lerte manipulas per ĝi brilan disvolvigon.

Revidi malnovan amatinon ekscitas eĉ maljunulon (Aŭtuna renkontiĝo) kaj oni facile perdiĝas survoje en la kvartalo nekonata kaj stereotipa (Labirinto en ĉina loĝkvartalo) k.a. La novelisto trovas ĝermon de la verko en ĉiutaga vivo kaj skribas ĝin en lerta plumado. Se la novelisto havas abundan provizon de tiuj ĝermoj, do li/ŝi povas abunde produkti serion da noveloj. Tiamaniere naskiĝas novelaro kiel tiu ĉi.

La aŭtoro verkis torenton da libroj en lastaj 10-20 jaroj. Ni povas facile trovi ilin en nia librejo. Kredeble ili estas al ni tiel familiaraj kiel tiu ĉi libro. Mi ankoraŭ ne legis ilin, sed tiu libro instigas min legi plu rilate al tiu aŭtoro. La mondo de esperanta literaturo estas pli vasta ol mi supozis.

Homoj modestaj, eĉ en Japanio

Sibayama Zyun'iti

Se oni tradukus japanen "Veronika" je "Mami"^[1] (en p.77), la rakonto "Nevidebla knabo" povas okazi en la moderna Japanio. Same, preskaŭ ĉiuj rakontoj, krom "Raŝo, Viktor, Stavris" temanta pri ciganoj, povas preni lokon en Japanio, nur per ŝanĝo de personaj nomoj. Varadinov en "Doktoro" povas esti

efektive okazinta ne-fikcio pri falsa kuracisto en nia lando, kian ni aŭdas unu fojon en kelkaj jaroj. Kvankam la ekzakta situacio de “Eraro” rilatas specife al la du-landa rilato bulgaria-hungaria, simila situacio povas okazi en Japanio por alilandanoj aŭ en iu-ajn-lando por japanoj. La roluloj en la rakontoj povas esti direktoro aŭ vicdirektoro kiel en “Vira doloro”, ĉiuj estas iel homoj modestaj, se tion aludas la plumnomo de la aŭtoro. Resume, la rakontoj priskribas homojn ĉie estantajn. Mi supozas, ke tian ĉi impreson havos ankaŭ alilandaj legantoj pensante pri sia lando. Iuj “mi” povas esti ja

mi – precipe la “mi” en “Labirinto en ĉina kvartalo”, ĉar similan senton mi havis en iam vizitita ĉina kvartalo.

Nu, la rakontoj montras ĉarmon ĉe metaforoj interesaj ĉe kelkaj lokoj: “En mia gorĝo kvazaŭ estas kakto” (p.30); “Ŝi havas hararon longan kiel akvofalo.” (p.77); “li havas nigran densan hararon, similan al brasiko” (p.88); “Liaj okuloj nun similas al du estingitaj karboj.” (p102).

[*] Mi preferus 真美 (Mami, t.e. Vero-belo), ĉar en nomo “Veronika” troviĝas Vero.

Prelego

Hama-Ronda Vespero en marto

mar. 19, 17h00-19h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa
temo: **Polenoj sub tero rakontas**
preleginto: Kijonaga Ĵoota

S-ro Kijonaga lernis Esperanton en duagrada mezlernejo Koorjoo en Jokohamo, kaj li komencis sian parolon (kun komputila projekcio) pri tiamaj memoroj, kaj en universitata studenteco. Li studis pri la historio de vegetalaro kaj arbaro, per analizo de polenoj. Tiu afero kondukas al la hodiaŭa prelego. Li menciis iaman tendencon en japana sciencista esperantujo, ke oni almenaŭ aldonu resumon de sia disertacio en Esperanto, kion li ja faris.

Li prezentis sin nunan, ke li profesie laboras en Tokia Ĉefurba Registaro por plani parkojn kaj verdaĵojn en urboj.

Sekvis lia hodiaŭa temaro, kun jena enhavo. (Resumis Sibayama Zyun’iti)

1. Plantoj kaj homaro

Japanio, lando plena de arbaro estas dividebla laŭnature al 3 regionoj laŭ arbospecoj: suda parto kun ĉiamverda arbaro, norda parto kun decidua (t.e. falfolia) arbaro, kaj la plej norda Hokajda aŭ altmonta parto kun konifera arbaro. Sed ekde homa kultivado kaj urbigado, tia vegetalaro estas ŝanĝita.

2. Esplori historion de arbaro

Por scii tian ŝanĝon de la vegetalaro, plej efika metodo estas esplori fosiliojn de polenoj. Ekzemple en Jokohamo, polenoj antaŭ 20 mil jaroj estas trovitaj, kaj oni konjektas ke tiama klimato estas pli malvarma ol la nuna.

3. Kio estas polen-analizo?

Poleno estas malgranda objekto, kun diametro je

1/10 mm, kaj analizata sub mikroskopo. El unu areo, oni elfosas teron, kaj per radioaktiva mezurado oni konas la epokon de la tero, en kiu polenaj fosilioj troviĝas. Oni nombras polenojn laŭ arbospeco, kaj trovas, kiuspecaj arboj multas kaj kiuspecaj malmultas. El tio oni konjektas la vegetalaran trajton de tiu epoko en tiu regiono.

4. Por altigi precizecon de la analizo

Sed, ĉu simpla nombrado validas? Ekzemple, en iu areo ŝajnas troviĝi vasta arbaro de pinoj (ĉiamverdaj) kaj malvasta arbaro de deciduaj kverkoj. Jen demando, ĉu pino povas havi pli multajn polenojn ol decidua kverko? Laŭ detala analizo oni trovis, ke (1) ju pli aĝa estas kverko, des pli multe da polenoj, sed ke (2) pino preskaŭ ne ŝanĝas sian produktadon malgraŭ sia aĝo. Per tia analizo, oni konkludis, ke en la areo, arbaro de deciduaj kverkoj pli grandis ol la arbaro de pinoj.



Ĉina legendo

Hundo kaj kato

Ji Yingeng



Longe, longe antaŭe ĉiuj bestoj prenis manĝaĵojn nur post kiam ili unue ilin ekvidis, sed nur kato flaris per la nazo kaj tuj trovis siajn manĝaĵojn. Tion eksciis hundo kaj ĝi petis katon: “Bonvolu instrui al mi vian unikan lerton. Ankaŭ mi volus trovi la manĝaĵojn nur flarinte per la nazo.”

La kato konsentis. La hundo restis en la hejmo de la kato. La kato komencis instrui al ĝi la lerton. Post multaj tagoj la hundo memfideme pensis ke ĝi jam ellernis la lerton kaj volis hejmeniri.

“Pacienciĝu iomete. Vi posedas la lerton ankoraŭ ne tute,” elbuŝigis la kato.

“Mi jam ellernis. Mi nepre hejmeniru,” la hundo insistis pri sia opinio.

“Bone, tamen ne hodiaŭ sed morgaŭ” pensinte jesis la kato.

En la sekva mateno la kato diris al sia edzino: “Kiam mia lernanto venos al vi kaj demandas pri mi, diru al li, ke mi eliris, kien vi ne scias.”

La hundo venis.

“Kie estas mia instruisto?” demandis la hundo.

“Ĝi eliris, sed kien ĝi iris mi ne scias,” respondis la katino. La kato intence foriris. Ĝi volis provi la flaron de la hundo. Poste la hundo, flarante per la nazo, iris laŭ la vojo laŭ kiu la kato jam iris. La kato sin kaŝis malproksime de la hejmo. Ĝi saltis de unu ŝtono al la alia. Ĝi enkaverniĝis ĉi tie kaj elkaverniĝis alie. Fine ĝi suprengrimpis arbegon kaj kaŝiĝis en la branĉoj de la arbego.

La hundo trovis la du ŝtonojn. Ankaŭ ĝi enkaverniĝis ĉi tie kaj elkaverniĝis alie, sed kiam ĝi alvenis al la arbego, ĝi iris, iradis tien kaj reen kaj neniel trovis la signon de la kato. La kato de alte ĝin vidis klarege.

“Rigardu alten, surarben,” kriis la kato fine sur la arbego.

“Vi hastas forlasi lernadon kaj finfine iĝis persono kun guto da scio. Vi nur povos flari vian manĝaĵon surtere,” diris la kato.



TIEL OKAZIS

Foiro de Civitanaj Agadoj

mar. 12 kaj 13, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

Civitanaj grupoj uzantaj la kunvenejon, kiel ni, havis ekspozicon. En la tera etaĝo estis nia stando por ekspozicio. En la 10-a etaĝo okazis klarigado kun komputilaj bildoj, kaj ni ankaŭ aliĝis al ĝi. Po 30 minutoj en la 2 tagoj, s-ro Nanba Fumiharu klarigis pri Esperanto.



NIAJ PLANOJ

Hama-Ronda Vespero en aprilo

apr. 16, 17h00-19h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

temo: **Prezento pri Esperanto — laŭ maniero mia**

Kelkaj personoj, kiuj lastatempe prezentis Esperanton al la publiko, montros al niaj membroj, kiel ili faris tion. Oni utiligu tiun ĉi ŝancon por plibonigi la metodon.

Unu-taga kurso

apr. 24, 15h00-16h50, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

Rudimenta kurso

De maj. 7 ĝis jul. 16, 15h00-16h50 (por 11 fojoj), ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

Gvidanto: s-ro Iwaya Mituru.

Kotizo: 6000 enoj